

ADORU 734

1. Kun — a-ma zor-go — paŝ-tas min
 2. Sur — ĉi-am - ver-daj — kam-poj mi

la — ĉi - am bo - na — Di - o;
 ri - po - zon dol - ĉe — ĝu - as,

mi es - tas Li - a, mi - a Li,
 kaj ki - e Li kon - du - kas min

kaj man - kas ja ne - ni - o.
 tran - kvi - laj ak - voj flu - as.

3. Vaginte de la vojo for,
 mizere mi ekmortis;
 sed Li, serĉinte, trovis min,
 kaj hejmen ĝoje portis.
4. Eĉ ombran valon de la mort'
 trairos mi sentime;
 kunestas Vi, kaj per baston'
 fortigos min anime.
5. Vi kovras tablon antaŭ mi,
 plenigas la kalikon,
 oleon verŝas por la kap',
 hontigas malamikon.
6. En daŭro de la tuta viv'
 bezonos mi neniam;
 pro Di-favoro restos mi
 en Lia domo ĉiam.

Psa 23

THE KING OF LOVE MY SHEPHERD IS • VH 83 • M (St. Columba):
 antikva irlanda himno, HON 484a • angla T: Sir Henry Williams Baker • E:
 M. C. Butler, 1966 en HE 111 • AK 173